



EKO 2021-51 sendita el Budapeŝto la 20an de novembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 78 – elstara kontribuanto

Kroatio estas bonvenigata al la granda familio de la AMO-programo. Ĝia unua seminario montris mirindan gamon da kulturaj agantoj. La kvalito meritis pli grandan publikon ol la ĉ. trideko, kiuj ja partoprenis. La malbeno de Zom-laciĝo. Tamen venis homoj el Francio, Italio, Koreio, Norvegio, Rumanio, Slovenio, Svislando, Ukrainio kaj Usono/Kostariko. Estis fascine malkovri la altan nombron de esperantistoj, kiuj aktive plenumas tradukajn taskojn. La seminarioj donis al ili valoran eblon diskuti siajn obstaklojn kaj spertojn.

Ne eblas resumi la tutan abundan diskutadon. Iuj ĉefpunktoj: Tradukisto al Esperanto tute ne konas sian publikon, ĉar ĝi estas tutmonda. Aliflanke, ĉar la granda plimulto de la Eo-tradukistoj akiris la lingvon postnaske, ili povos esti unike kapablaj koni la cel-lingvon kaj ĝian kulturon. Kontraste, alilingvaj tradukistoj kutimas traduki el sia denaska lingvo al malpli konata lingvo. Gravegas koni intime la cellingvon kaj la gamon da kulturaj konoj posedataj de la ricevanto de la traduko – la tradukisto laboras klarigi idiomoaĵojn kaj konceptojn, kiujn ili tre eble ne komprenos. Ĉe traduko al Esperanto, tiom flekseblas la lingvo, ke eblas ofte esprimi fajnajn nuancojn el la fonta nacia lingvo.

Resumo konciza: SMG

Ni jam dissendis kun EKO 50 unu prezentaĵon, nun ni aldonas du pliajn.

## Esperanto-urboj kaj Eo-vilaĝoj. Kio necesas?

Ekzistas retejo, kie la Esperanto-centroj povas montri sin.

[Esperanto-centroj | Home \(esperanto-centroj.info\)](http://esperanto-centroj.info)

Ekzistas plano por krei Esperanto-vilaĝojn kaj Esperanto-urbojn laŭ la modeloj de Pluezek (Francio) kaj Herzberg (Germanio). Jen ĝi:

Por esti **ESPERANTO-VILAĜO**, vi devas

- meti laŭ la ĉefstratoj en 2-3 ĉefaj enirvojoj de la vilaĝo la ŝildon **ESPERANTO-VILAĜO**

- havi minimume dek librojn en Esperanto aŭ pri Esperanto aŭ vortarojn en la vilaĝa biblioteko, aŭ en la vilaĝa administrejo aŭ en la vilaĝa lernejo
- akcepti Eo-staĝon, eventon en la vilaĝo per faciligoj laŭ viaj ebloj
- salutigi la partoprenantojn de tiaj eventoj aŭ salutigi gravulojn de la Eo-movado alvenintajn en vian vilaĝon fare de la vilaĝestro, prezidanto aŭ simila gravulo de via vilaĝo
- posedi Eo-flagon kaj uzi ĝin laŭ la eventoj
- meti je senpaga dispono klasoĉambron, kaze ke estas surloke instruisto de Esperanto kaj interesatoj, kiuj volas lerni la lingvon
- meti la informon pri via statuso de ESPERANTO-VILAĜO en via oficiala retejo
- decidiigi esti ESPERANTO-VILAĜO fare de la vilaĝa parlamento aŭ vilaĝestro aŭ administrejo depende de la lokaj strukturoj

#### Por esti ESPERANTO-URBO, vi devas

- meti laŭ la ĉefstratoj en 4-5 ĉefaj enirvojoj de la urbo la ŝildon ESPERANTO-URBO
- havi minimume 25 librojn en Esperanto aŭ pri Esperanto aŭ vortarojn en la urba biblioteko, aŭ en la urba administrejo aŭ en la urba lernejo
- akcepti Eo-staĝon, eventon en la urbo per faciligoj laŭ viaj ebloj
- saluti la partoprenantojn de tiaj eventoj aŭ saluti gravulojn de la Eo-movado alvenintajn en via urbo fare de la urbestro, prezidanto aŭ simila gravulo de via urbo
- posedi Eo-flagon kaj uzi ĝin laŭ la eventoj
- meti je senpaga dispono klasoĉambron, kaze ke estas surloke instruisto de Esperanto kaj interesatoj, kiuj volas lerni la lingvon
- meti la informon pri via statuso de ESPERANTO-URBO en vian oficialan retejon
- decidi esti ESPERANTO-URBO fare de la urba parlamento aŭ urbestro aŭ administrejo depende de la lokaj strukturoj

Ampleksa artikolo en la decembra revuo *Esperanto* prezentis la agadon de la unua Esperanto-urbo Herzberg-am-Harz, okaze de ĝia 25-jara jubileo.

## Francio daŭre aktivas por ni ĉe Unesko

Mi aldonis la dokumentojn de ILEI al artikolo pri la rilatoj inter Unesko kaj Esperanto de la retejo de Esperanto-Francio: en Esperanto kaj la franca.

<https://esperanto-france.org/UNESCO-et-Esperanto>

Mi profitas la okazon por peti pliajn tradukojn de la teksto de tiu artikolo, ĉefe en la Unesko-oficialajn lingvojn (en, es, ru, ar, zh).

<https://esperanto-france.org/unesko-kaj-esperanto>

Helpantoj bonvenas!

Didier Loison, +33 688 903 009

## Seminario: La rolo de naciaj lingvoj en supera edukado

Duan fojon ĉi-jare nia norvega landa asocio NEL invitas al retaj seminarioj pri diversaj (ne-)movadaj temoj. Jaŭdon la 25-an de novembro inter 20:00 kaj 21:30 ni prezentos interesan temon por komuna diskutado kaj kleriĝo: Kiun rolon havas (kaj havu) la naciaj lingvoj en supera edukado kaj scienco? Ĉu ili iĝas marĝena aldonaĵo aŭ nura administra suplemento al esence anglalingvaj studprogramoj kaj scienca publikigado? Aŭ ĉu kontraŭe ili restas gravaj, kaj la angla ilin nur komplementas en specifaj uzokampoj? Kaj ĉu tio ĉi entute estas problemoj?

Ne estas la plano fari plene profesiajn prezentojn de fakuloj. Sed almenaŭ en Norvegujo estas faritaj pluraj raportoj pri la fenomeno, kaj ni ŝatus prezenti iom el tiuj. Ni ankaŭ esperas, ke partoprenos la seminarion reprezentantoj de niaj najbaraj landoj, kaj ke ili povos prezenti ankaŭ la staton en siaj landoj. Enkondukos Bård Hekland, komentos pluraj niaj membroj surbaze de propraj spertoj kiel universitataj aŭ esplorinstitutaj dungitoj.

La seminario okazos per Zoom. Aliĝu per retpoŝta mesaĝo al [oficejo@esperanto.no](mailto:oficejo@esperanto.no) plej laste merkredon la 24-an de novembro. Vi ricevos retpoŝte la ligilon al la aranĝo.

## Galerio de gepoetoj - Paulo Sergio Viana

El Belartaj Konkursoj kaj Esperanto Viva)

<https://youtu.be/uwEDUZKwKC4>

mga

===== vortoj: 800 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj



Helpantoj:  
Rob Moerbeek  
Gbeglo Koffi  
François  
Lo Jacomo

### ENHAVO

- AMO 78 – riĉa programo<sup>1</sup>
- Eo- urboj kaj Eo-vilaĝoj
- Unesko kaj Francio
- Supera edukado – kiulingve?